

Heinrich Heine,

## Libro de la kantoj, Lirika intermezo, II

*tradukita de Manfred Retzlaff*

El ĉiu el miaj larmoj  
Elkreskas tre bela flor',  
Kaj miaj suspiroj fariĝas  
De najtingaloj ĥor'.

Kaj se vi min amas, ineto,  
La florojn mi donos al vi,  
Kaj kantos sub via fenestro  
La najtingal' por vi.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Lyrisches Intermezzo, II" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984-02-23.*

*MR-144-1 / Arg-715-1437 (2012-12-09 13:08:56)*